

Monto Olimpo

Monto Olimpo (latina: *Olympus Mons*) estas ŝilda vulkano sur planedo Marso. Alta je 27 km supre de la meza nivelo de la ebena, ĝi estas la plej alta monto el la sunsistemo.

La unua nomo de tiu vulkano, malkovrita de la itala astronomo Giovanni Schiaparelli, estis “Nix Olympica” (la neĝoj de Olimpo). Ĉar ĝi estas loko kun granda albedo, oni supozis ke tie estus neĝo. Oni nun scias ke la albedo venas ne de neĝo sed de nuboj.

Olympus Mons situas nord-oriente de la nord-okcidenta rando de la kupolo de Tarsis, grandega ŝvelaĵo de la marsa supraĵo, entenante plurajn vulkanojn: Arsia Mons, Pavonis Mons kaj Ascraeus Mons.

Ĝi estas ĉirkaŭata de regiono nomata “aŭreolo de Olympus Mons” en kiu estas krestoj kaj egaj blokoj.

Olympus Mons leviĝas al 27 km supre de la ĉirkaŭanta ebenaĵo, ĝia diametro, ĉe la bazo estas proksimume 550 kilometroj kaj, preskaŭ tute ĉirkaŭanta ĝian bazon estas krutaĵo alta je 2 ĝis 6 km. La origino de la krutaĵo estas malbone konata. Oni teorias, ke terglitoj estigis ĝin, kaj la glitintaj materioj formis la “aŭreolon”. La terglitoj estus ŝuldata al rapida fondo de subtera glacio, aŭ tektonika movo. Alia hipotezo estas ke la vulkano estis origine sub-glacia kaj formiĝis sub glaĉiero dika je du ĝis tri kilometroj da glacio.

En kulmino de la vulkano estas kaldero larĝa je 60 km kaj longa je 80 km, formita de unuiĝo de kvin krateroj.

En 2004, la kosmosondilo *Mars Express* fotis sur la deklivo de Olympus Mons fluojn da lafo maljunaj de malpli ol du milionoj da jaroj.

La grandego de la vulkano Olympus Mons povus esti ŝuldata al la fakto, ke Marso ne havas tektonajn platojn. Do, la lafo, kiu supreniras el la varma makulo fluas al la surfaco ĉiam ĉe la sama punkto de milionoj da jaroj.

Retpaĝo: www.traduki.de

Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Olympus_Mons